

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 8/1987 • Kr 8,50

Jubileumsårets facit:
två nya klubbar i Sverige!



Och här på bilden styrelsen för den nya esperantoklubben i Katrineholm: Agneta Emanuelsson, ordf., Gunilla Eriksson och Helén Ohlsson. Bert Lindquist var den som tagit bilden.

Kvalitets- auktion II

Vi fortsätter med vår auktion på de fina böcker vi fått från Carléns, Engholms och andras bibliotek.

Även nu gäller, att alla böckerna är inbundna och i skick som nya, med undantag för att någon bok kan ha ett ex libris eller ett namn inskrivet.

Alla är de klenoder, men vi kan inte underlåta att framhålla nr 26. Den intresserade esperantisten frågar sig ofta, varifrån ett visst ord kommer. Var hämtades t ex "kolbaso"? Svaret finns i det etimologiska lexikonet.

Gör som förut: Du har två veckor på dig att lämna in ett bud på önskad nummer till Esperanto-Centro, Brunnsgratan 21, 111 38 STOCKHOLM.

Skriv "Auktion" på kuvertet.

Auktionslista

16. Forge, Mr Tot aĉetas mil okulojn, 1931
17. Svisa Antologio, 1939
18. Berneman, Miru, pensu, ridu, 1950
19. Sienkiewicz, La lanternisto, 1940
20. Neergaard, Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj, 1954
21. Luyken, Pro Iŝtar, 1924
22. Crofts, Morto de trajno, 1948
23. Kivi, Sep fratoj, 1947
24. Shakespeare, Hamleto (övers. L. L. Zamenhof), 1964
25. Norway, La aventuroj de Marteno Drake, 1936
26. Barhien, Naŭlingva etimologia leksikono, 1950
27. Dante, Infero (övers. K. Kalocsay), 1933
28. Boulton, virino ĉe la landlimo, 1959
29. Bernadotte, La fino (övers. S. Engholm)
30. Goethe, Faŭsto, 1949

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga, tel. 0589-155 31

Sättning: Per Aarne Fritzon

Utformning: Franko Luin, Tyresö

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1987

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppettider: måndag – torsdag kl. 08.00 – 16.00 och 17.30 – 19.00; fredag kl. 08.00 – 15.00; lördag kl. 10.00 – 12.00 (september – maj).

Postgiro: 2012-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 100 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 50 kr.

Ungdomsmedlem 50 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga, tel. 0589-155 31 (La Espero, massmedier)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Pl. 2265, 425 00 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (Esperantoförbundets årskongresser)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Åke Rohdin, Engelbrektsgratan 25A, 702 13 Örebro, tel. 019-18 53 60 (utredningar)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-16 26 87 (utveckling)

Suppleant: Ingemar Nordin, Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm, tel. 41 46 37 (kansliet)

Suppleant: Bertil Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Informationskommittén: Bernt Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga, tel. 0589-155 31.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-122029

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september – 15 maj: onsdagar 10 – 11, torsdagar 17 – 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året, även under sommaren.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Anita Lindblom.

Enhavo

- 78 Kvalitetsauktion II
- 79 Prezidanto: La granda laboro restas antaŭ ni
- 81 Stöd UEA
- 82 Nova klubo en Upplands Väsby
... kaj ankaŭ en Katrineholm!
- 83 TRA LA LANDO
Raporto de la stokholma klubo
Esperanta teatraĵo en pola kafejo
Lyckat möte i Linköping
Semajnfina kurso
- 85 Dum pentekosto la jarkongreso de SEF
- 86 La kavaliro en nigra felo de Ŝota Rustaveli
- 87 UEA INFORMAS
Manson: La evoluantaj landoj bezonas esperanton
Konferenco ekzamenos lingvon kaj kulturon ĉe UN
Tonkin akceptita ĉe la pola kaj nederlanda misioj
- 87 Prelegvojaĝantoj serĉataj
- 88 Ankaŭ Malmö en proksimradio
- 89 Esperanto en lingvistika kongreso
- 89 Donacoj
- 90 Målet nått?
- 90 Faktoj pri Svedio
- 91 Många kom till kursdag i Värnamo
- 92 TABULO
- 93 Eblas lui filmon Esperanto

Prezidanto:

La granda laboro restas antaŭ ni

Kiam oni staras sur sojlo de nova jaro, oni kutime resumas la okazintaĵojn de la pasinta kaj esprimas deziron kaj esperon por la nova jaro.

Oni ja povas konstati, ke la pasinta jubilea jaro estis sukcesa, laŭ raportoj de kluboj kaj laŭ diversaj statistikaj informoj. Ni starigis parlamentan apog-grupon. Kelkaj libroj estis eldonitaj. Ni havis festan kongreson en la Parlamenta domo. Eĉ du novaj kluboj estis fonditaj, en Upplands Väsby kaj Katrineholm, kun viglaj kaj energiaj estraranoj.

Kion do pri la estonteco?

Mi volas citi el la parolado de Humphrey Tonkin antaŭ la kongresanoj en Varsovio:

“Kion alportos tiu dua jarcento al Esperanto? Same kiel la unuaj adeptoj de la lingvo de doktoro Esperanto, same kiel la laboristoj, kiuj presis tiun broŝureton, ni apenaŭ povas profeti. Unu afero estas tamen tute klara: la lingvo mem, kiu pasis tra la fandejo de cent jaroj de evoluo, brile sukcesis. Neniu, kiu ĝin uzas, povas dubi, ĉu ĝi estas lingvo plena kaj kompleta. Neniu, kiu uzis ĝin en la scienco aŭ legis ĝian literaturon, povas tion diri – eĉ se necesas daŭre ĝin modernigi kaj ankoraŭ kompletigi. Sed se ĝi brile suk-



cesis kiel lingvo, ĝi ankoraŭ ne brile sukcesis kiel lingva komunumo - la plejparto de la homoj ankoraŭ ne parolas ĝin, eble eĉ nenion scias pri ĝi. Ni havis niajn sukcesojn tiurilate: jen okazis sukcesoj informkampanjaj aŭ instruagadaj, jen oni akiris oficialan rekonon, jen fakuloj serioze ĝin traktis. Sed la granda laboro restas antaŭ ni.”

Jes, la granda laboro restas antaŭ ni!

Konvinki parlamentanojn, lernejestrojn, radion, televidon, ktp, ke Esperanto prezentas la plej bonan solvon, ĉar ĝi estas facila, ĝi estas neŭtrala, ĝi traktas ĉiujn homojn en spirito de egaleco. Sed por tiu giganta laboro ĉiuj esperantistoj devas kunhelpi.

Humphrey Tonkin daŭrigis: “La lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui.”

Kompreneble mi volas, ke ni ankaŭ ĝuu la lingvon, sed ne forgesu, ke estas via devo disvastigi Esperanton. Ni ĉiuj esperantistoj, malgraŭ la 100 jaroj, estas pioniroj de Esperanto, kaj ni devas agi laŭ pionira spirito.

Roland von Malmborg iam mi ĵus diris - VIA helpo estas kantis en radio belegan kanton neces!
esperante, kiu montras tion, kion

Karin Lindquist

*Unu homo ne povas fari la pacon
kaj du homoj ne povas fari la pacon
sed el du kaj du ni faros milionojn
do venos niaj tagoj
do venos niaj tagoj.*

*Manoj de unu ne kreas la novan mondon
manoj de du ne kreas la novan mondon
sed el du kaj du ni faros milionojn
do venos niaj tagoj
do venos niaj tagoj.*

*Okuloj de unu ne vidas kien iri
okuloj de du ne vidas kien iri
sed el du kaj du ni faros milionojn
do venos niaj tagoj
do venos niaj tagoj.*

*Voĉo de unu ne povas vekti la mondon
voĉoj de du ne povas vekti la mondon
sed el du kaj du ni faros milionojn
do venos niaj tagoj
do venos niaj tagoj.*

*Unu esperantisto ne faras mondkomprenon
du esperantistoj ne faras mondkomprenon
sed el du kaj du ni faros milionojn
do venos niaj tagoj
do venos niaj tagoj!*

Julklapps-

tips

Ge något du inte gett tidigare! Ge vägen till ett helt språk:

Första brevet i brevkursen, Lilla ordboken, Gerda malaperis, Esperanto! Nyckel till det internationella språket och Vivu la stel' - allt för
60 kr.

Eller

Första brevet i brevkursen, Liza kaj Paŭlo, texthäfte och kassett, Vivu la stel', Esperanto! Nyckel... och Esperantisk-svensk ordbok - allt för
110 kr.

Beställ hos
Förlagsföreningen
Esperanto,
Malmö, pg 578 - 5,
eller hos
EsperantoCentro,
pg 2012 - 3,
Esperantoförbundet

Porto ingår i priserna och vid köp över 500 kr utgår 10 % rabatt på "Julklappstips", övriga 5 %.

Kumeuaua, djungelns son.

Ett litet fartyg går på grund i floden Araguaya i Sydamerikas djungler. Indianpojken Kumeuaua hjälper de nödställda att skaffa mat och reparera fartyget. En enastående lektion i överlevnad.

Kumeuaua, skriven på Esperanto av Tibor Sekelj. Översatt till sexton språk, nu också till svenska. 68 sidor. Omslag i färg. En bok för både unga och gamla. I slutet av boken information om Esperanto. En lämplig present. Låt klubben köpa hem en bunt till försäljning.

Pris 45 kr. Vis köp av minst tre exemplar: 38 kr. Portokostnad ingår.

Nordenstorms
förlag

Lilla Nygatan 3 B
961 34 BODEN

Telefon: 0921-515 51
Postgiro: 57 20 82-6

Inför 1988

Stöd UEA genom att bli individuell medlem!

Medlemsavgiften till UEA är oförändrad för 1988.

MJ	medlem med årsbok 88 kr
MA	medlem med årsbok och tidningen Esperanto 220 kr
DM	dumviva membro kostar 5.500 kr , men då får man tidningen Esperanto och årsboken under hela sitt liv.

Tänk på inflationen!

För 440 kr (utöver årsavgiften) kan man bli medlem i Societo Zamenhof. Det betyder att man med sitt bidrag ytterligare stöder UEA, men också att man några gånger under året får ett rundbrev från UEA:s ordförande och att man vid kongressen blir inbjuden till en särskild mottagning med UEA:s ordförande som värd.

Världsunngdomsförbundets motsvarighet till Societo Zamenhof heter Patrono de TEJO. Att bli medlem där kostar 264 kr. För de pengarna får man tidningen Kontakto, cirkulär från TEJO och inbjudan att under kongressen delta i en mottagning med ordföranden.

Är man under 26 år den 1 januari det aktuella året, blir man ungdomsmedlem och får tidningen Kontakto gratis. Ange därför födelsedatum på postgirotalongen.

Kanske blev ni så glada över att avgifterna inte har höjts, att ni vill hjälpa esperantister i länder med olika svårigheter. Det kan ni göra genom att betala in valfri summa till Fondajo Canuto (hjälp åt esperantister i länder med icke konvertibel valuta) eller Fondajo Azio-Afriko (för att

understödja Esperantokampanjen i tredje världen).

Avgifterna sätts in på postgiro 14 74 29 - 5, Svenska Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad inbetalningen gäller.

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 00 HÖRBY
tel. 0415/501 52

Planerar du att t ex resa till

NORDISK FORUM
nästa sommar?

Eller är du engagerad i kvinnorörelsen på något sätt? Eller är du ändå intresserad?

Vi vill skapa ett kontaktnät inom Esperantorörelsen för kvinnor som är intresserade av att tillsammans "ta med" Esperanto i annan verksamhet.

Skriv till Esperanto-Centro. NU!

Anita Lindblom
Valborg Hansson-Seger

...till ROTTERDAM

med Svenska Grannskap och Norrköpings Esperantoförenings ungdomssektion **La Grifetoj**. Vi skall naturligtvis upprepa vår lyckade alternativa resa från i somras - eller hur?

Vi lägger inte på några extra kostnader på vår resa. Detta innebär att Du har kvar friheten att själv bestämma hur mycket du vill lämna i gåva till vårt Esperantoförbund under året. Intresseanmälan kan göras skriftligen till Svenska Grannskap, Box 1106, 600 41 Norrköping, eller på telefon, Mikael Hultgren 011/11 83 90.

P.S. De ungdomar som tänker besöka ungdomskongressen i Jugoslavien, och därefter bevista kongressen i Rotterdam, och "åker ut" med interrail-kort, vill vi erbjuda vistelse i Rotterdam el. dess närhet och hemresa med buss, om vi får tillräckligt många deltagare. Anmäl intresse.

Nova klubo en Upplands Väsby

La klubo de Stockholm estas la plej granda en la lando, sed tion oni ne vidas de ĝia societa agado.

Tio dependas de pluraj cirkonstancoj. Unu estas, ke multaj membroj devas okupiĝi pri la laboro de la sveda federacio en Esperanto-Centro. La alia estas, ke oni devas oferi horojn por veturi al kunveno kaj reen.

Tial ni ofte diskutis la eblecon starigi grupojn en la antaŭurboj. Tio nun okazis en Upplands Väsby, kie naskiĝis la klubo "Esperanto en Upplands Väsby".

La estraro estas i a Erik Bohlin, jam de longe sperta esperan-

tisto, kaj la familio Caisa kaj Ole Hansen, novbakitaj.

Al la klubo aniĝis deko da

komencantoj, kaj ili intencas kunveni en Väsby la samajn tagojn, kiel la klubo en Stockholm kaj okupiĝi pri lingvistudado, sed kiam la programo en Stockholm logas, ili kune veturos tien por partopreni.

Saĝa ideo, ĉu ne?

I.N.

...kaj ankaŭ en Katrineholm!

La 13-an de oktobro 1987 fondiĝis Esperantoklubo en Katrineholm. Dank' al intensa informado, la naskiĝon ĉeestis granda nombro de interesatoj, gastoj kaj reprezentantoj de la loka gazeto.

Post mallongaj salutvortoj de sinsekve la iniciatinto Agneta Emanuelsson, la reprezentanto de la studorganizo TBV, Lennart Eriksson, la prezidanto de SEF, Karin Lindquist, la regiona respondeculo, Ulf Ribers, kaj unu el la gejunuloj de la klubo en Norrköping, Mikael Hultgren, 12 ĉeestantoj tuj aliĝis kiel membroj de la nova klubo. La elektita estraro konsistas el Agneta Emanuelsson (prezidanto), Gunilla Eriksson kaj Helén Ohlsson. Post la fondiĝo, Karin Lindquist kaj Haldo Vedin gratulis kaj transdonis donacojn de SEF kaj la klubo de Norrköping. La optimisma etoso de la kunveno tucerte signifas sukcesoplenan vivon de tiu nia plej nova klubo.

H.V.

SUR NIA BRETARO

Antologio de maltaj poetoj	60 kr.
Borg, I, Plupo kaj la grandarbaro	38 kr.
Plupo kaj la ursidoj	48 kr.
Ĉina antologio 1919-1949	120 kr.
Cseh-kurso kun help-materialo	164 kr.
Gilbert, W, Pri landnomoj en Esperanto	8 kr.
Heide, Z, Groteskaj dialogoj	36 kr.
Kalevala	310 kr.
Lindgren, A, La fratoj Leonkoro	105 kr.
Mia vivo	13 kr.
Pausewang, G, La lastaj infanoj en Oldrovalo	98 kr.
Saint-Exupéry, A, La eta princo	122 kr.
Sekelj, T, Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo	49 kr.
Stevenson, R, D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde	67 kr.
Tavanti, C, Varmas en Romo	120 kr.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Box 7502, 200 42 Malmö

Kristana literaturo

Ĉiam havebla favoreprezo
ĉe ESPERANTO-MISIO
Box 2007, 694 02
HALLSBERG 2, Poŝta
ĝirkonto 8 84 51. Tel.
0582-523 79 Sandberg

Tra la lando

Raporto de la stokholma klubo

La klubo fariĝos membro de Stockholms FN-förening ek de januaro 1988.

Niaj kontaktoj kun rapide kreskanta movado en Afriko fortiĝos. Ni ĝemeliĝos kun la klubo Maendeleo en Tabora, Tanzanio. Tiu estas la klubo de Bernard Nzaniye, kiu sube prezentas ĝin. Ankoraŭ ne estas planoj pri la organizado de la kunlaboro. La plej urĝaj kaj gravaj bezonoj de la afrikaj komencantoj estas kontaktoj kaj gvidado.

Nzaniye Bernard, kiu vizitis Svedion dum pli ol unu monato, rakontas pri sia klubo en Maendeleo en Tabora:

La klubo naskiĝis la kvaran de majo 1986. La deko da partoprenintoj elektis kvar gvidantojn: Muhindo Kalafuri, prezidanto, Mulunda Kabeya, sekretario, Nzaniye Bernard, bibliotekisto kaj Ngendakumana Jean-Bosco, kasisto. Tiujn nomojn vi certe renkontos plurfoje. La klubo konsistas el homoj de diversaj landoj, ĉefe junuloj el Burundio kaj Zairio.

La unua esperantisto estis la prezidanto. Li esperantiĝis en 1985. Ĝis nun nur li havas edzinon, kaj du gefilojn. Li lernis per koresponda kurso el Nederlando, kies instruisto estas Hans Bakker.

Post la fondiĝo de la klubo oni diskutis pri bona maniero lerni Esperanton. La deko da partoprenintoj havis entute tri leterkursojn. Oni decidis, ke ĉiu havigu al si kajeron aŭ paperojn kaj notu mem la tutan kurson en sia kajero. La taskojn oni skribu sur aparta papero por transdoni al kamarado, kiu korektas. Laŭ tiu metodo oni laboris kaj

laboras. Konsilinda, kompreneble, ĉar ĉiu kursano nepre skribas ĉiun vorton de la kurso, kaj pli bone memoras la lecionojn.

Maendeleo ludis gravan rolon en la disvastigo de Esperanto en la regiono Tabora. Pri tio ni revenos alian fojon. La klubanoj estas politikaj rifuĝintoj kaj pro malsekureco dum la lasta duonjaro kelkaj nun forlasis Kigwa, la rifuĝejon, por vivi en aliaj lokoj.

Dags att prenumerera!

Prenumerera på en eller flera Esperantotidningar, så får du veta vad som händer i Esperantovärlden och du tränar samtidigt språket. Priserna gäller för 1988. (* avser 1987 års priser. Nya priser annonseras så fort uppgifterna inkommit från de olika redaktionerna.)

OBS! Ny adress för beställning

Beställningarna skickas till: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 HÖRBY, och pengarna skickas till Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby, pg 14 74 29 - 5.

El Popola Ĉinio	90 kr
El Popola Ĉinio, 2 år	150 kr
El Popola Ĉinio, 3 år	210 kr
Fokuso	60 kr
Fonto	113 kr
Heroldo de Esperanto	115 kr
Hungara Vivo	*91 kr
ICEM Esperanto	60 kr
Juna Amiko	30 kr
Kancerkliniko + La Krom	90 kr
Kontakto	66 kr
Kulturaj Kajeroj	*68 kr
La Jaro	25 kr
La Mevo	*150 kr
Literatura Foiro/Planlingvistiko	*145 kr
Literatura Foiro	*95 kr
Monato	190 kr
Norvega Esperantisto	60 kr
Oomoto	56 kr
Ovo	*91 kr
Paco	66 kr
Scienca Revuo	80 kr
UN kaj Ni	44 kr

Esperanta teatraĵo en pola kafejo

En la nova restoracio Café Piastowska, kun malnova etoso, ni, ĉ. 20 esperantistoj, kaj aliaj, sentis nin kvazaŭ translokitaj al iu malgranda strata kafejo en Pollando. Kvankam mankis alkoholarĵoj, aŭ eble eĉ pli bone tiel, la pol-sveda personaro akceptis nin kun sprita humoro.

La teatraĵo, Aniaro, de nia fama poeto Harry Martinson, estis prezentita de la aktoro Jerzy Fornal de la nacia teatro en Varsovio. Estis ege viva, sentema prezento de la pensoj de Harry Martinson, kiu fantazie rakontas pri spaca ŝipo, konstruita de homoj kaj pereanta survoje en la estontecon.

La prezentaĵo estas monodramo, ĉerpita el la esperanta traduko de William Auld kaj Bertil Nilsson. La elĉerpon faris Gunnar Gällmo, kiu ankaŭ enkondukis la vesperon. La etoso estis agrabla. La kafejo surprize regalas nin per kafo kaj torto.

Ingrid Ottosson

TEDU-regiono: Lyckat möte i Linköping

Den 19 oktober samlades 25 deltagare från Hallsberg, Katrineholm, Kisa, Linköping, Motala, Norrköping, Sturefors och Vingåker till regionsträff i Linköping. Inga Björkeby, som förberett mötet, hälsade välkommen och redogjorde för dagens program. Haldo Vedin och Inga Björkeby utsågs till ordförande respektive sekreterare för träffen.

En introduktionskurs med sju

deltagare leddes av Margaretha Skarin, och Haldo Vedin ledde diskussionen om klubb- och regionsangelägenheter.

Gunilla Sundholm hade av sagt sig uppdraget som regionsansvarig och efter diskussion föreslogs Ulf Ribers som efterträdare. Han kunde dock endast lova att åtaga sig uppdraget som tillförordnad till början av februari och på villkor att arbetet delades upp.

Nästa TEDU-träff bestämdes till början av mars, i trakten av Katrineholm. Två nybörjarkurser, varav den ena för barn, samt en konversationskurs under veckoslutsträffen beslöts. Som exempel på lämpliga kursformer nämndes Cseh-metoden och den i Bulgarien praktiserade suggestopedin.

Från Hallsbergs Esperantoförening underströks nödvändigheten av att föryngra klubbarna, bl a genom kurser för barn i åldrarna 10 - 15 år.

Representanter från de deltagande klubbarna redogjorde för de aktiviteter man haft under året.

TEDU-bladet, som inte utkommit under året, diskuterades. Redaktören skall kontaktas.

I samband med den pedagogiska diskussionen presenterade Mikael Hultgren "Grodan", en av La Ranetoj producerad lärobok för nybörjare.

Lupo

Suda regiono: Semajnfina kurso

Dum la 10-a kaj 11-a de oktobro, la Suda distrikto havis semajnfina kurson en Frostagården ĉe Hörby. 19 personoj partoprenis. Unu grupo, gvidata de Anna-Maria Lange, trejnis

konversacion, gramatikon, skribadon kaj kantadon, kaj la alia grupo studis retorikon teorie kaj praktike. Iva Åberg gvidis tiun grupon kaj denove fokusis el sia ŝajne neelĉerpebla lingvokono.

Lisbet Andreasson

Pentekoste en Sundsvall

La jarkongreso de SEF okazos en Sundsvall dum la pentekosto – la 21-an, 22-an kaj 23-an de majo 1988.

La komitato jam laboras por fari allogan kongreson kaj esperas, ke esperantistoj venos multnombre por viziti ilian urbon. Kaj same esperas la estraro de SEF, kiu krome deziras progresan kongreson.

Legu la artikolon, per kiu LKK prezentas sian urbon.

Sundsvall

Dum pentekosto la jarkongreso de SEF


En Sundsvall ĉio estas en la mezo. La urbo situas meze en Svedio, inter du grandaj riveroj kaj inter du grandaj montoj. Ĝi vere ne estas iu grandurbo, sed definitive ankaŭ ne iu eturbo. Ĝi estas kvazaŭ meze.

Post kiam Sundsvall estis fondita en 1621 de Gustav II Adolf, ĝi estis meze en la centraj historiaj okazaĵoj. Estis ĉi tie en Sundsvall, kie la moderna industria socio kreskis en la mezo de la deknaŭa jarcento kaj la maŝinsegiloj estis uzataj. Sundsvall kreskis kaj fariĝis la centro por arbar- kaj lignoindustrioj. Daŭre ĝi estis en la mezo. La rodo estis plenplena de velŝipoj kaj en la drinkejvarmo en la havenoj plej multaj lingvoj intermiksiĝis. Ĉi tie naskiĝis la sindikata batalo por pli bonaj kondiĉoj por la segejaj laboristoj.

Jes, se ni povus translokiĝi 100 jarojn malantaŭen en la tempo, ni troviĝus meze de bolanta kaldrono kun lignopatronoj, arbarkampuloj, ŝipestroj kaj laboristmastroj, punĉverandoj kaj kaŝdrinkejoj. Meze de tiu hektika periodo, la urbo forbrulis en 1888.

Kiam vi nuntempe venas al Sundsvall, vi trovas multe pli trankvilan, sed espereble same streĉe interesan miksaĵon.

Hodiaŭ la ingrediencoj estas floranta kultura vivo, gvidata de la mirinda Kultura Magazeno, la teatro kaj la Tonhalo. Vi trovas vivan amuzan vivon kaj la plej viglan komercan straton, kun pli ol 100 vendejoj. Anstataŭ la punĉverandoj kaj kaŝdrinkejoj, nun estas simpatiaj restoracioj kaj ĉarmaj kafejoj. La etoso kaj la ĉarmo de la malnova urbo



tamen ne ŝanĝiĝis.

Ĉi tie ni povas doni al vi kelkajn sugestojn pri vidindaĵoj en Sundsvall:

Sur la Norda monto estas krom moderna restoracio kaj kafejo, ankaŭ antikva kaj metia muzeo kaj malmoderna kampara vendejo. Ĉi tie situas ankaŭ la hejmo por migrantoj (Gaffelbyn), kie supozeble loĝos la gejunuloj dum nia estonta kongreso.

La plej interesa en la nova Sundsvall, estas la nova Kulturmagazeno, en kiu ankaŭ troviĝas biblioteko. Tiun interesan muzeon oni faris el kvar malnovaj magazenoj por koloniproduktaĵoj, kiujn oni kunligis per mirinda vitra konstruaĵo. Tie oni kolektis multe de la interesa his-

torio de la urbo Sundsvall, multe de la nova arto en la moderna urbo, ktp. Venu kaj vidu!

Alia tre interesa novaĵo en Sundsvall estas "Tonhallen", kie oni povas aŭskulti la plej grandajn artistojn de nia kaj aliaj landoj. De tie oni memoras la belan inaŭguron en televido sub gvido de Kjell Lönnå.

Inter la multaj hoteloj en Sundsvall oni povas mencii du, kun kiuj ni plej multe konatiĝos. La unua estas hotelo Sundsvall en la Popola domo, kie nia jarkongreso havos siajn ejojn, kaj kie eble plej multaj kongresanoj loĝos. Eble ni vizitos ankaŭ la novan grandan hotelon sur la Norda monto.

Anna Ericson

Libro eldonenda:

La kavaliro en tigra felo de Ŝota Rustaveli

Aŭskultonte prelegon en la kartvela ĉefurbo Tbilisi (Tifliso), mi hazarde renkontiĝis kun sperta kaj tre aktiva esperantisto: Zurab Makaŝvili - botanikisto kaj specialisto pri abeloj. Evidentiĝis, ke li estas la tradukinto de la libro "Aforismoj de Ŝota Rustaveli", eldonita antaŭ kelkaj jaroj en Tbilisi kaj ankoraŭ haveblebla ĉe UEA.

La aforismoj devenas el la kartvela nacia epopeo *La kavaliro en tigra felo*, verkita fine de la 13-a jarcento, kaj konsiderata la akmeo de la kartvela

literaturo. Ĝi estas kvazaŭ sintezo de orientaj kaj okcidentaj mezepokaj verkoj, miksanta la ideojn kaj idealojn de Persio unuflanke, kaj de Grekio/Bizancio aliflanke. Dum sep jaroj s-ro Makaŝvili tradukadis la epopeon, ampleksantan pli ol 1 500 kvarversajn strofojn, kaj nun finpoluras ĝin por eldono.

La brila kaj lerte rimigita traduko jam estis laŭdita en la soveta esperantista bulteno, sed bedaŭrinde la kontaktoj kun kartvelaj eldonejoj ankoraŭ ne estis fruktodonaj, kvankam oni

jam eldonis la epopeon en pluraj nacilingvaj tradukoj, ekz. ruse, angle, france kaj germane.

Krom tiu traduko, s-ro Makaŝvili okupiĝis ankaŭ pri pli modernaj poetoj, precipe de la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Jen du ekzemploj (el *Antologio de kartvela poezio*; ankaŭ ĝi libro eldonenda). La unua estis verkita dum la naciromantika periodo, fine de la pasinta jarcento, fare de la plej elstara, multtalenta kartvela intelektulo Ilia Ĉavĉavadze (1837-1907):

*Jam folias la arbar'
Jen pepadas la hirund'
Orfa vito sen berar'
ploras pro feliĉ' kaj vund'*

*Vidu, floras herbokamp'
En montet' eglanteri'
Volus scii mi, poet'
Kiam floras vi, patri'*

(Printempe oni kutimas subtranĉi branĉojn de vito, por ke el ili guton post guto iru suko.)

La dua estas pli moderna, verkita de la kartvela poetino Ana Kalandadze, kiu sendube estas la plej populara poetino nuntempe en Kartvelio:

Nubegoj

*Sur piramidoj ili transiris,
Ĥetlandon, Midion ankaŭ vidis,
Landon urartan, kartvelan
vizitis,
Do, kien iris, oni ne sciis.*

*Kiom da montoj ili transnaĝis,
Kian ĉielon ili distranĉis,
Nubegoj, kien nubegoj paŝis,
Neniu sciis kaj rimarkis.*

La Espero 1988

La eldondatoj por La Espero dum 1988 estos (proksimume):

	Aperdato	Limdato por materialo
nro 1	15-a de februaro	15-a de januaro
nro 2	31-a de marto	15-a de februaro
nro 3/4	15-a de junio	15-a de majo
nro 5	31-a de aŭgusto	30-a de julio
nro 6/7	15-a de oktobro	01-a de septembro
nro 8	30-a de novembro	15-a de oktobro

La materialo devas esti korekte tajpita kun duobla lini-inter-spaco.

Anoncoj

Estas eble anonci en La Espero laŭ jena tarifo:

1/1 paĝo	1.200 kr
1/2 paĝo	725 kr
1/4 paĝo	425 kr
2 kolumnoj x 6 cm	250 kr

Joakim Enwall

UEA informas

Manson: La evoluantaj landoj bezonas Esperanton

Parolante antaŭ la internacia Konferenco pri Malarmado kaj Evoluigo, ĉe la Domo de UN la 27-an de aŭgusto, d-ro Julius Manson, vica reprezentanto de UEA ĉe UN, alvokis al plia utiligo de la internacia lingvo Esperanto fare de la evoluantaj landoj. "Evoluantaj landoj aparte bezonas interŝanĝon de faka sperto kaj disdividon de teknika scio", sed ilin ofte haltigas lingvaj diferencoj. Unujara

studado de Esperanto flanke de ĉiuj koncernatoj eliminus tiujn barilojn kaj metus ĉiujn landojn sur egalan, sendiskriminacian bazon.

La rimarkoj de d-ro Manson estis mallongigita versio de la referaĵo de UEA pri malarmado kaj evoluigo, kiun oni pli frue distribuis al la konferencanoj, kaj kies teksto aperis en la septembra Novaĵletero de UEA.

Konferenco ekzamenos lingvon kaj kulturon ĉe UN

"Lingvo kaj kulturo en internaciaj organizoj" estos la temo de la 6-a Internacia Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, kiu okazos ĉe UN vendrede la 11-an de decembro. La konferencon kune organizos la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kaj la Traduka Fako de UN. La unutaga aranĝo esploros la efikon de lingvaj kaj kulturaj diferencoj ĉe komunikprocedoj ene de or-

ganizaĵoj kiel la sekretariato de UN, kaj en rilatoj inter ŝtatoj en la kunteksto de internaciaj organizaĵoj.

Aparte bonvenaj ĉe la konferenco estos UN-personaro kaj reprezentantoj de landaj misioj. Proponojn pri referaĵoj kaj aliajn demandojn oni sendu al d-ro Humphrey Tonkin, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono.

Tonkin akceptita ĉe la pola kaj nederlanda misioj

La 21-an de septembro la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, vizitis la mision de Pollando ĉe UN, kaj pasigis unu horon en tre pozitivaj diskutoj kun la ambasadoro koncerne subtenon

flanke de la pola registaro al Esperanto ĉe UN. Li ankaŭ renkontiĝis kun funkciulo de la nederlanda misio por raporti pri la ĵusa Universala Kongreso kaj varbi ankaŭ la helpon de la nederlanda registaro.

UEA UEA UEA UEA UEA UEA UEA UEA

Prelegvojaĝantoj serĉataj

Granda subteno por malproksimaj esperantistoj, i a en Afriko, estas la vizito de vojaĝantaj esperantistoj. Se tiaj vizitantoj estas lingve spertaj, ili povas

•prelegi en loka klubo;

•viziti lokajn aŭtoritatojn, ĵurnalistojn, ktp, por pruvi, ke esperantistoj ekzistas tutmonde, kaj ke Esperanto funkcias;

•instrui la lingvon (se ili kompetentas) dum mallongaj sed intensaj kursoj; ktp.

Se vi jam planas vojaĝon al tiaj landoj, turisme aŭ profesie, nepre konsultu nin anticipe. Faru tion frue, ĉar la poŝto estas malrapida.

Se vi ne jam planas vojaĝon, sed volonte tion farus se vi ricevus iom da monhelpo por tio, vi ankaŭ skribu al ni. Informu pri viaj kompetentoj pri lingvoscio, Esperanto-instruado, profesio kaj spertoj en rilatoj kun ne-esperantistaj medioj. Kiom longe vi povus vojaĝi? Kien prefere? Provizore nia celo estas okcidenta Afriko, precipe. Reagojn atendas:

Hans Bakker
Kastelenstraat 231
NL-1082 EG Amsterdam

*Bonan
Kristnaskon
kaj
Prosperan
Jaron deziras
la estraro de
SEF al ĉiuj
legantoj.*

Je ondlongo 90.2

Ankaŭ Malmö en proksimradio

La 25an de aŭgusto ekparolis Radio Esperanto laŭ la frekvenco 90.2 en la proksimradio de Malmö. Tio signifas, ke en ĉiu semajno ĉirkaŭ 250000 homoj en Malmö, se ili volas, povas aŭdi 30-minutan programon pri, kaj parte en, esperanto.

Ĉi tie en Malmö, same kiel en multaj aliaj lokoj en la lando, funkcias vigla Esperanto-klubo kun interesaj programoj. La klubanoj uzas vere mirindan fenomenon, nome neŭtralan internacian lingvon. Ni scias tion, kaj ni ĝojas pro tio, ke nia 100-jara lingvo vivas. Sed ĉu la 250000 homoj ekster niaj klubejaj muroj scias pri niaj aktivecoj per esperanto?

Estas tragedio kaj granda problemo, ke en niaj amaskomunikiloj oni tiel malmulte parolas kaj skribas pri la ekzisto kaj vivo de la internacia lingvo.

Ekde kelkaj jaroj ni svedoj havas tre favoran eblecon fari

ion al tiu problemo. Apud la tradiciaj aktivecoj en la klubo ni nun povas utiligi amaskomunikilon, la proksimradion, mem fari la radioprogramojn laŭ niaj deziroj, kaj disaŭdigi ilin al niaj komunumaj loĝantoj.

Niaj ĝisnunaj spertoj konvinkis nin, ke la proksimradio estas vera ŝanco por nia movado rompi sian izolitecon. Kompreneble ni same kiel antaŭe, aŭ eĉ pli multe ol antaŭe, devas daŭrigi per ekspozicioj, intervjuoj por gazetoj, personaj informoj ktp. Sed la proksimradio povas fariĝi nia daŭra amaskomunikilo!

Por havi efikon nia kluba agado devas esti nodita al tia daŭra amaskomunikilo. Se aliaj ne faras nian laboron, ni faru ĝin mem! Ne estras tro komplike aŭ multekoste fari la programojn.

Pere de radio ni atingas la hejmojn de diversaj gravaj grupoj:
•kiuj nenion scias pri esperanto

kaj hazarde aŭskultas

•lernantoj, kiuj malsatas je pruvoj, ke esperanto vere vivas kaj estas uzata

•aktivaj klubanoj, kiujn ni volas stimuli kaj servi

•klubanoj, kiuj pro diversaj kialoj ne aktivigas, sed hejme povas sekvi nin.

Ofte en niaj kongresoj ni diskutas jenan problemon: Kial la hodiaŭa junularo ne emas viziti klubojn, kiel la nun matura generacio faris kiel gejunuloj? La solvo estas facila. Se ili ne vizitas nin, ni vizitu ilin, en ilia hejmo!

Estas kromefikoj, kiujn mi volas mencii. En la laboro per la programoj ni konatiĝis kun multaj interesaj personoj, kaj sekve ankaŭ ili kun esperanto. Kiam antaŭ mallonga tempo estis intertraktado pri la dissendhoraro ekde la 1-a de oktobro, la ĉirkaŭ 80 societoj, inter ili la politikaj partioj, kiuj dissendas en Malmö, povis konstati, ke ankaŭ esperanto ĉeestas.

Ĉiusemajne aperas esperanto en la gazetaro inter la programoj de la proksimradio.

Laŭ la nova horaro Radio Esperanto (Malmö) dissendas ĵaŭde je la 17.30 en la frekvenco 90.2. Ni estas aŭdeblaj en Malmö kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Venis, ekzemple, reago el Lund de aŭskultanto.

Klubo Esperantista de Malmö estas organizita laŭ firmaj jar-komitatoj, tiel ankaŭ por Radio Esperanto. Komitatanoj estas Anna-Maria Lange, kiu interalie faros radiokurson, Lennart Magnusson, Börje Nordström, teknikisto kaj Sten Svenonius, programrespondeculo kaj vic-teknikisto.

Mi petas vin serioze pripensi la eblecojn uzi la proksimradion en via loko.

Volonte mi konsilos kaj kuraĝigos vin!

Jaro sen propra amaskomunikilo povas esti perdita jaro.

Sten Svenonius
Tel. 040-91 54 82

KARLSKOGA FOLKHÖGSKOLA ESPERANTO-LINJEN 1988

Nybörjarkurs med start 11/1 (nästan fullteknad),
fortsättningskurs med start 14/3.

Undervisningen omfattar minst 25 veckotimmar inkl. några timmar internationella utblickar. Tillvalsmöjligheter. Effektiva studier, alla åldrar och trevlig samvaro. Utmärkt för dem som själva vill undervisa i framtiden eller som vill göra ett angenämt och givande uppehåll i utbildning eller yrkesverksamhet.

Upplýsingar lämnas av Karlskoga Folkhögskola,
691 24 Karlskoga, tel. 0586/503 60 vx.

P.S. Julklappstips: en Esperantokurs på Karlskoga Folkhögskola till barn eller barnbarn.

Esperanto en lingvistika kongreso

Por la tria fojo en la historio de la lingvistaj internaciaj kongresoj, interlingvistika problemo ludis rolon. La kongresojn de 1931 en Genevo kaj 1948 en Parizo sekvis en aŭgusto ĉi-jare la kongreso en Berlino.

La berlina kongreso pritraktis la kadran temon "Unueco kaj diferenceco en la nuntempa lingvoscienco. Disciplinoj kaj interdiciplinaj alproksimiĝoj kaj rezultoj".

Pro la bona reputacio, kiun interlingvistiko ĝuas en la lingvistikaj rondoj de GDR, ne estis malfacile proponi al la organizantoj enkadrigon de la koncerna temaro en la kongresan programon.

Dum la kongreso funkciis oficiala "Ronda Tablo Interlingvistiko/Planlingvoj". Ĝin iniciatis, preparis kaj gvidis d-roj Detlev Blanke, Ronald Löttsch (ambaŭ el GDR) kaj Sergej Kuznecov (Moskvo).

Inter la dek prelegoj, kvar rekte pritraktis Esperanton, nome "Esperanto kiel interlingvo de aŭtomata tradukado" de d-ro Klaus Schubert, Utrecht, "Pri la facileco de Esperanto" de Stanislav Kosečky, Bratislava, "Diakronio en planlingvo - ĉe la ekzemplo de la 100-jara Esperanto" de d-ro Detlev Blanke, Berlin (GDR), kaj "Gramatikaj germanismoj en Esperanto" de d-ro Ronald

Löttsch, Berlin (GDR). Krome d-ro Victor Sadler prelegis pri "Aŭtomata tradukado".

La prelegojn sekvis vigla diskuto inter la lingvosciencaj eminentuloj, parte en la germana, angla kaj franca lingvoj, sed kelkfoje en Esperanto.

Donacoj

Klubo Cent Jaroj

Torsten Irdevall, Ämmeberg, 100:-

Klubo Cent

Gunnar Börjesson, Göteborg, 100:-; Karin Sehlstedt, Johannessov, 100:-

Donacoj

A. Bernhard 50:-; Södra distriktet, memore al Olle Persson, Trelleborg, 200:-; Ulla Luin, memore al Olle Persson, Trelleborg, 50:-; G.A. Larsson, Örebro, 100:-.

Först kom "Esperantokompendum". Nu är

GRODAN ÄNTLIGEN HÄR!

La Ranetojs självinstruerande snabbkurs i Esperanto. Färdig efter sex år av bearbetning och grundlig utprovning vid undervisning på olika håll i Sverige. Granskad och gillad av sakkunniga. Efter provupplagan har kursledarna inte lämnat oss någon ro - nu kan alla få den!

Så här beställer du Grodan:

Sätt in pengarna på La Ranetojs postgiro 8 88 02 - 4, så kommer den med posten; eller ring till Berit och Kajsa på tel. 0753/339 28, så får du den med faktura.

Priser: 1 - 9 ex 70 kr/st

10 - 49 ex 65 kr/st

50 - ex 47 kr/st

Priserna inkluderar porto.

Bästa läroboken för kurs eller självstudium!

GRODAN



Målet nått?


Med friskt mod har SEF hävdad att 100-årsjubileet skall innebära att alla svenskar skall ha haft möjlighet att höra talas om esperanto i år. Men hur mäter man det? Inte med en enkät till alla mantals-skrivna, det ger sig ju självt, men en måttstock som får duga i sammanhanget är statistiken över pressklipp.

Under åtta månader har vi nu följt upp pressklippen och här följer en liten redogörelse:

Artiklar eller notiser har förekommit i 96 tidningar och tidskrifter med en sammanlagd upplaga på 4,9 miljoner exemplar. Om vi tänker oss att varje tidning blir läst av i genomsnitt två personer, så innebär detta att målet är nått. Närmare än så här kan vi nog inte följa upp.

Men lite mer statistik kan ju vara intressant. Vi får veta att *Arbetet* publicerat esperantomateriel flest gånger, tätt följd av *Falköpings Tidning* – och detta utan att radioprogrammet tas med, där esperanto dyker upp så gått som varje vecka. I TEDU-regionens tidningar kan man också läsa om esperanto ofta, men glädjande nog kommer rikstidningarna *Dagens Nyheter* och *Aftonbladet* högt på listan. Inte mindre än 24 tidningar finns med när man ser vilka som tagit in materiel minst fem gånger och antalet exemplar för dessa blir 2,09 miljoner.

Det är väl inte att förvåna sig över att *Ingemund Bengtsson* ofta



dyker upp i spalterna. I den regionala pressen finner vi att Karlskoga Folkhögskola och Hålabäcksskolan med eldsjälarna *Lars Forsman* och *Inga-Lill Thyrefeldt* uppmärksammas.

Geografiskt har spridningen också blivit god. Från Trelleborg till Luleå hittar man klipp, med koncentration till ett brett bälte tvärs över landet från Göteborgstrakten till huvudstadsregionen.

Vidstående karta visar med punkter var tidningarna finns och punkternas storlek ger en antydning om antalet klipp. En liten prick står för ett klipp och den största (Stockholm) för 25.

Anita Lindblom

Faktoj pri Svedio

Kiel last-minutan jubilean donacon la Sveda Instituto eldonis esperantan version de "Faktoj pri Svedio".

Enhavante abundajn ĝeneralajn informojn pri nia lando, la folio tre taŭgas kiam vi ekzemple parolas pri Svedio eksterlande, aŭ vi povas sendi ĝin al geamikoj tra la mondo.

Ni ricevis stokon al Esperanto-Centro, sed vi povas ankaŭ mendi rekte ĉe Svenska Institutet, pl 7434, S-103 91 Stockholm.

Många kom på kursdag i Värnamo

Smålandsregionen anordnade den 17 oktober en kursdag i Värnamo i samarbete med ABF och biblioteket. Omkring 35 deltagare från Småland, Blekinge och Halland hörde Marco Dutra från Rio berätta om sitt hemland Brasilien. Kerstin Rohdin ledde en introduktionskurs för nybörjare och biblioteket visade Esperantoförbundets affischutställning, samt en sammanställning av frimärken, brev och vykort som undertecknad erhållit från korrespondens-kamrater i hela världen.

Anna Lorentz

La redakcio de *La Espero* dankas ĉiujn kunhelpantojn kaj kontribuantojn kaj deziras

Bonan Kristnaskon kaj Aktivan Jaron 1988!

TABULO

Bronislava Bacílková
Poznanská 439/22
181 00 PRAHA 8
Ĉeĥoslovakio

29-jara farmaciistino. Ŝatokupoj:
Literaturo, pentroarto, aplikita arto,
folkloro kaj tekstteknikoj.

Elizabeta Janusz
ul. Krowoderska 74/3
31-158 KRAKÓW
Pollando

33-jara sekretarino en
mezlernejo interesiĝas
pri vojaĝoj, literaturo,
muziko, ĉiutaga vivo,
ktp.

Hana Skeršiková
Sítneho 20
394 70 KAMENICE NAD LIPOU
Ĉeĥoslovakio

31-jara oficistino. Volas korespondi pri
vivo, lando kaj sciiĝi de la leteramikoj
pri iliaj ĝojoj kaj zorgoj.

Luděk Vencí
Leninova 1688/1
256 01 BENESOV
Ĉeĥoslovakio

33-jara komencanto
volas korespondi pri
ĉiutaga vivo, precipe
folk- kaj kantrimuziko,
gitarludado kaj fotado.

Ladislav Královec
Dům 77
345 32 CESKA KUBICE
Ĉeĥoslovakio

62-jara fraŭlo, seĝelaboristo. Ŝatas
muzikon, naturon, fervojon, mapojn
kaj spritaĵojn.

Zdenek Kolensky
Dlazdená 954
268 01 HOROVICE
Ĉeĥoslovakio

31-jara laboristo, interesiĝas pri filmo,
teatro, kulturo, muziko, sporto, jogo,
kaj kolektas BK.

Eva Nolvá
Ohradni 1353
140 00 PRAHA 4-MICHLE
Ĉeĥoslovakio

30-jara ekonomikistino deziras
korespondi pri filmo, teatro, kulturo,
sporto, naturo kaj turismo, kaj kolektas
bildkartojn.

Anna Janusz
ul. Krowoderska 74/3
31-158 KRAKÓW
Pollando

29-jara oficistino deziras
korespondi pri literaturo,
filmo, muziko, vojaĝoj
kaj popolaj kutimoj.

Alba Pröver
Fritz-Reutherstr. 30
NEUSTADT-GLEWE-
MECKLENBURG
GDR

69-jara virino deziras
leteramikinon.

Krzysztof Maksymowicz
Pasieczna 14 m 9
91-358 LODZ
Pollando

40-jara kuracisto volas
korespondi kun svedaj
kuracistoj aŭ flegistinoj.

Stanislav Kares
Tylova 1262
508 01 HORICE
Ĉeĥoslovakio

42-jara agronomo-plantprotektanto.
Ŝatas florojn, geografion,
vojaĝadon, sporton kaj fotadon.

Kare Krejca
Pad Hybsmankov
2348/17
150 00 PRAHA 5-
SMICHOV
Ĉeĥoslovakio

29-jara. Hobioj: Filmo,
teatro, kulturo, vojaĝoj
kaj bildkartoj.

ROTTERDAM

Redan nu kan du anmäla dig till kongressen i Rotterdam 23-30 juli 1988.

Om du anmäler dig före den 31 december får du den lägsta kongressavgiften.

Kongressavgifter (i skr):

	Till 31/12 87	Till 14/5 88	Från 15/5 88
1. Direkt medlem i UEA	440:-	550:-	660:-
2. Icke direktmedlem i UEA	550:-	660:-	770:-
3. Kunulo/junulo/handikapulo, som själv är direktmedlem i UEA	220:-	330:-	440:-
4. Kunulo/junulo/handikapulo som inte själv är direkt- medlem i UEA	330:-	440:-	550:-

Beställ anmälningsblankett hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 Hörby, tel. 0415/501 52. Blanketten skall sedan tillbaka till samma adress. All betalning sker till pg 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

Årsavgifter

för direkta medlemmar 1988

Direktansluten medlem	100 kr
Direktansluten familjemedlem (utan tidning)	50 kr
Direktansluten ungdomsmedlem	50 kr

Betala in avgiften genast så slipper ni belasta minnet med att komma ihåg det!

STEN SVENONIUS
ENIKSTORPSSGATAN 26 A
217 54 MALMÖ

KM 07

Eblas lui filmon ESPERANTO

La laŭdata filmo "Esperanto (en la mondo)" nun estas luebla ankaŭ en Svedio kun sveda parolo.

Estas la sama filmo, nun sur video-VHS-bendo, kiu estis prezentita plurfoje dum la 72-a UK en Varsovio. Ĝi estas bona propagandilo kaj interesa filmo eĉ por esperantistoj. Ĝi estas verŝajne la sola dokumentfilmo, kiu montras la aplikon de la Internacia Lingvo en multaj sferoj de la vivo.

Pri la sveda parolo: Nu, ĝi estas trivoĉa. Ni volas plibonigi tiun parton. Post viaj proponoj pri plibonigoj, ni ankaŭ aldonos kromajn voĉojn.

La luprezo estas 65 kr, inkl. la afrankon. Vi ricevos ankaŭ kasedon kun nur la esperanta parolo. Mendu ĝin ĝire al pĉk 914 18 - 4 (Willem Posthuma). Indiku la daton, vian telefonnumeron kaj vian adreson. Vi povas ankaŭ skribi aŭ telefoni: Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås, tel. 021/13 35 29.